

FINNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO-ASOCIO DE FINNLANDO

(N:roj 6 & 7) Provnumero

SEPT.—OKT. 1907

Jaro 1:a

ABONPREZO: Jare Sm. 1: 20 (Fmk 3: —) 1/2-jare „ 0: 70 („ 1: 75) Unu numero „ 0: 10 („ 0: 25)	REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO ILAREJO ESPERANTISTA HELSINKI FINNLANDO	ANONCPREZO: 4 sd. (10 pennoj) por ĉiu milimetro. Por 3, 6, 9 aŭ 12 enpresoj, respektive 10, 15, 20 aŭ 25% -a rabato.
--	--	--

AL NIA LEGANTARO

ni hodiaŭ havas la plezuron prezenti nian gazeton en sia nova vestaĵo. La granda intereso por ĝi, kiun eĉ dum somero pasinta montris niaj samideanoj, kuraĝigis la administracion elirigi „Finnan Esperantiston“ jam de nun en formo presita. Certe la nuna abonantaro ne estas sufiĉe granda, por fari la ekonomion certa por la venonta jaro, sed la tagoj jam pasintaj nin konvinkis pri tio, ke ni posedas la konfidon de niaj amikoj kaj sekve ne devas dubi pri la estonteco. Ni ankaŭ volas esti konvinkitaj pri tio ke niaj amikoj ne lasos nin sen apogo, sed, kiel ĝis nun, per oftaj kunlaboraĵoj helpas al ni fari la enhavon de „F. E.“ bona kaj interesa.

La programo kaj celo de „F. E.“ restos neŝanĝata. Ĝi estas ligilo inter la samideanoj en Finnlando kaj sciigilo pri la movado en kaj eksterlanda. Cetere la redakcio laŭeble dediĉos spacon al rakontoj, elektitaj bonaj literaturaĵoj k. t. p. celante per tio fari okazon al novaj adeptoj kaj lernantoj de nia lingvo ekzercadi en ĝi.

La abonprezo estas por la pasanta jaro Fmk 1: 50 (por ĉiuj n:roj de la komenco). Sed poste „Finna Esperantisto“ kostos Jare Fmk 3: — kaj 1/2-jare Fmk 1: 75.

Ĉiuj sciigoj kaj al la redakcio kaj al la administracio estu sendataj nur sub adreso: Ilarejo Esperantista, Helsinki. Manuskriptoj, alvenintaj al la redakcio post la 5:a de ĉiu monato, estos enpresataj nur en la numero de la sekvonta monato.

Fine ni petas pri pardono pro la malfruiĝo de tiu ĉi numero.



PAROLADO DE D:ro ZAMENHOF

ĉe la malfermo de la

TRIA UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO.

Karaj samideanoj! Konforme al la ĝisnuna moro, mi komencas mian parolon per tio, ken mi permesas al mi en la nomo de ĉiuj kongresanoj esprimi nian saluton kaj dankon al la lando, kiu



gastame nin akceptis, kaj precipe al niaj britaj samideanoj, kiuj per multaj laboroj kaj granda zorgemeco pretigis por ni tiun feston, en kiu ni nun ĉiuj partoprenas. De la momento, kiam niaj britaj amikoj invitis nin al si, ni ĉiuj estis konvinkitaj, ke nia kongreso en ilia lando havos apartan signifon kaj estos epokofaranta. Kaj ne estas malfacile antaŭvidi, ke nia espero nin ne trompos, ĉar tion ĉi garantias al ni ne sole la konata energio kaj sindoneco de niaj britaj amikoj, sed ankaŭ la karaktero mem de ilia lando.

La fakto, ke ni kongresas nun en glora universitata urbo de Granda Britujo,

havas grandan signifon. La kontraŭulo de nia ideo konstante ripetadis al ni, ke la angle parolantaj popoloj neniam al ni aliĝos, ĉar ne sole ili malpli ol ĉiuj aliaj popoloj sentas la bezonon de lingvo internacia, sed por ili la fortikiĝado de lingvo internacia estas rekte malutila, ĉar tia lingvo konkurados en ia mondo antaŭ ĉio kun la lingvo angla, kiu celas fariĝi internacia. Kaj tamen rigardu, kiel forte eraris niaj kontraŭuloj! Rigardu, kiel multope jam aliĝis al ni la Britoj, kiuj tiel nevolonte lernas aliajn lingvojn krom sia nacia; rigardu, kun kia amo ili preparis nian kongreson kaj en kia granda nombro ili aperis, por deziri al ni bonvenon! Tio ĉi montras antaŭ ĉio, ke la homoj komencis jam kompreni, ke lingvo internacia estas utila ne sole por popoloj malfortaj, sed ankaŭ por popoloj fortaj; sed tio ĉi montras ankoraŭ alian aferon, multe pli gravan: ke la homoj vidas en la esperantismo ne sole aferon de egoisma oportuneco, sed gravan ideon de intergenta justeco kaj frateco, kaj al tiu ĉi ideo volas servi la noblaj homoj de ĉiuj popoloj, tute egale, ĉu iliaj popoloj estas fortaj aŭ malfortaj, kaj ĉu la intergenta justeco estas por ili profita aŭ malprofita. Ni scias, ke la plimulton de niaj britaj samideanoj alkondukis al ni la interna ideo de la esperantismo, kaj tial ni tiom pli ĝoje esprimas al niaj britaj amikoj nian koran dankon. La Kembriĝanoj akceptas nin hodiaŭ ne kiel komercistojn, kiuj alportas al ili profiton, sed kiel apostolojn de ideo homara, kiun ili komprenas kaj ŝatas; koran dankon al la Kembriĝanoj, koran dankon al la glora Kembriĝa universitato; kiu pruntis al ni siajn ĉambrojn, koran dankon al la Kembriĝa urbestro, kiu gastame zorgis pri nia bono. Ni kore salutas vin, granda brita popolo, ni plej respektive salutas vian altan reprezentanton, Lian Reĝan Moŝton. Vivu la reĝ' al vi, tre longe vivu Li, gardu Lin Di'! (Aplaŭdo.)

Samideanoj! En la momento de la malfermo de nia tria kongreso ni ne povas silenti pri la tro multaj amikoj, kiujn la Morto kaptis dum la pasinta jaro; vi ĉiuj memoras, ke tuj post la Ĝeneva kongreso, ni sciigis pri la malŝanca morto de Dro Lloyd, prezidanto

de la Liverpoola Grupo. Ni perdis ankaŭ du eminentajn amikojn de nia afero, la gloran scienculon Berthelot kaj profesoron Michael Foster, kiu esperis nin akcepti en Kembriĝo. Fine mortis nia plej kara samideano kaj amiko, kiu estis la animo de niaj ĝisnunaj kongresoj, la ĉefa motoro de nia lasta kongreso en Genevo, la fondinto, subteninto kaj inspirinto de nia konstanta kongresa komitato. Vi ĉiuj scias, pri kiu mi parolas. Nia neforgesebla amiko Javal plu ne ekzistas. Al vi, amikoj-esperantistoj de ĉiuj landoj kaj al vi, niaj estimataj gastoj, kiuj simpatias nian aferon, mi proponas, ke ni honoru la memoron de nia multmerita samideano kaj de ĉiuj mortintaj Esperantistoj per levigo de niaj seĝoj.

Samideanoj! Antaŭ tri semajnoj finiĝis ĝuste dudek jaroj de la tago, kiam aperis publike la unua libro pri la lingvo Esperanto. En ĉiuj partoj de la mondo la Esperantistoj festis tiun tagon. Kiel fondinto de Esperanto, mi ricevis en tiu tago multajn gratulajn telegramojn kaj leterojn. Ĉar mi ne havas kancelarion, sed mi devas men ĉion plenumi en miaj liberaj horoj, tiel oni facile komprenos, ke respondi ĉiujn ricevitaĵojn esprimojn de amikeco estis por mi afero absolute ne ebla, kaj oni min facile pardonos. Mi uzas nun la bonan okazon, por esprimi mian plej sinceran dankon al ĉiuj, kiuj sendis al mi amikajn bondezirojn. La gratuloj apartenas kompreneble ne al mi persone, sed al la tuta batalantaro esperantista, kaj mi estas nur la centra punkto, en kiu kolektiĝis ĉiuj gratuloj, por resalti de tie al ĉiuj flankoj de la mondo, al ĉiuj lokoj, kie loĝas kaj laboras niaj senlacaj samideanoj. Kvazaŭ silente komisiita de la tuta esperantistaro, mi vokas al ĉiuj esperantistoj-batalantoj: mi vin gratulas! Mi kore vin gratulas, ke vi paciencis elteni en la daŭro de dudek jaroj, malgraŭ la multaj atakoj kaj malagrablaĵoj, kiuj al neniu el vi mankis. Mi kore vin gratulas pro tiuj rezultatoj, kiujn donis via energia kaj sindona dudek-jara laborado. Dudek jaroj da laborado por la esperantismo! kion tio signifas, — oni komprenos nur iam poste, kiam oni legos la detalan historion de la esperantismo. Kian grandegan gravecon havas niaj ĝisnunaj akiroj, tion oni ankaŭ ĝuste komprenos nur iam poste, kiam oni ekscios detale la historion de niaj unuaj jaroj, kiam la akiro de ĉiu nova Esperantisto estis ligita kun senfina laborado kaj oferado.

Multaj el vi konas la historion de la lastaj dek jaroj de la esperantismo, kiam la longe dormintaj semoj komencis doni la unuajn trunketojn; sed tre malmultaj el vi konas la historion de la unuaj dek jaroj, kiuj konsistis el senfina, ŝajne tute sensukcesa semado. La historio de la esperantismo iam rakontos al vi pri ĉiuj tiamaj semantoj.

Nun nia afero staras forte. La glacia tavolo da antaŭjuĝoj de la mondo estas rompita, kaj nia afero kreskas regule

kaj senhalte. Ĉiu jaro potence pligrandigas niajn fortojn kaj ni iras al nia celo jam kun plena trankvileco. Centoj da miloj da radikoj kaj radiketoj subtenas nian arbon, kiu jam ne timas la venton. La naturo, kiu longan tempon batalis kontraŭ ni, batalas nun por ni, ĉar tiu sama forto de interco, kiu longan tempon terure malhelpis ĉiun nian paŝon, ĝi mem nun ŝovas nin antaŭen. Eĉ se ni volus nun halti, ni jam ne povus.

Mi transiras al la vera temo de mia hodiaŭa parolado. Mi volas paroli al vi hodiaŭ pri la esenco kaj celo de niaj kongresoj. Sed por eviti ĉian malkompreniĝon, mi tuj en la komenco atentigas vin ke mia parolo ne estas io oficiala, ĝi prezentas simple mian personan opinion, kiun ĉiu el vi povas aprobi aŭ ne aprobi.

Ĉar ni decidis kunveni ĉiujare el ĉiuj landoj de la mondo kaj multaj el ni faras eĉ tre grandajn oferojn, por povi partopreni en niaj kongresoj, tial ni devas klarigi al ni, por kio ni kunvenas. Se ni konscios bone la esencon kaj celon de niaj kongresoj, tiam ni venados al ili kun ĉiam freŝa kaj neniam malfortiĝanta entuziasmo, kiel homoj, kiuj klare vidas antaŭ si la belan celon, al kiu ili iras; sed se ni ne konscios la celon de niaj kongresoj, tiam ni baldaŭ tute malvarmiĝos por ili, kiel homoj, kiuj vagas sencele kaj kiujn tiu vagado baldaŭ lacigas kaj enuigas. Por kio do ni kunvenas? ĉu ni kunvenas por paroli pri esperantaj lingvaj demandoj? Ne! tiuj ĉi demandoj apartenas ne al la kongreso, sed ekskluzive al la Lingva Komitato, kaj por ili sufiĉas kongreso de komitatanoj. Ĉu ni kunvenas por ekzerciĝi en esperanta parolado? Por tio sola ni ne bezonas veturi al kongreso, ĉar en niaj hejmaj grupoj ni povas en la daŭro de la tuta jaro multe pli ekzerciĝi, ol en la kelkaj tagoj de la kongreso, kaj por la sola kelktaga ekzerciĝo en parolado neniu entreprenus grandajn vojaĝojn. Ĉu ni kunvenas por fari manifestacion kaj sekve propagandon! Jes, certe! Sed ĉar el cent kongresanoj almenaŭ naŭdek-naŭ havas de Esperanto nur moralan profiton, por kio do ni ĝin propagandas? Mi ne dubas, ke la plimulto el vi donos al ni nur unu respondon: ni faras manifestacion kaj propagandon por la esperantismo ne pro ia utilo, kiun ĉiu el ni persone povas havi de ĝi, sed pro tiu gravega signifo, kiun la esperantismo havas por la tuta homaro, pro tiu komunehoma celo, kiu nin, aktivajn Esperantistojn, altiris al Esperanto; ni kunvenas ĉiujare el ĉiuj partoj de la mondo, por havi la ĝojon vidi samideanojn, por premi al ili la manon, por varmigi en ni per reciproka renkontiĝo kaj kunvivo la amon kaj entuziasmon por la ideo, kiun la esperantismo en si enhavas. Kiel la antikvaj hebreoj tri fojojn ĉiujare kunvenadis en Jeruzalemo, por vigligadi en si la amon al la ideo monoteisma, tiel ni ĉiujare kunvenas en la ĉefurbo de Esperantujo, por vigligi en ni la amon al la ideo esperantisma.

Kaj tio ĉi estas la ĉefa esenco kaj la ĉefa celo de niaj kongresoj.

Ĉar la mondo ĉiam komprenis ke la esperantismo estas forte ligita kun certa interna ideo, kaj tre multaj personoj ne volis lerni kaj uzi Esperanton nur tial, ĉar ili ne volis esti rigardataj kiel partianoj de ia ideo, tial — por ne fortimigi de ni la grandajn amasojn, — ni estis devigitaj klarigi per la Bulonja deklacio, ke la simpla esperantisteco, t. e. la uzado de la lingvo Esperanto, neniu devigas esti partiano de tiu aŭ alia ideo, ke ĉiu Esperantisto restas homo tute libera kaj unuj Esperantistoj ne respondas por la ideoj de aliaj Esperantistoj. Sed se la simpla pratika esperantisteco, t. e. la simpla lernado kaj uzado de Esperanto, neniu devigas aliĝi al la ideo, tamen neniu povas dubi, ke ĉiujn, aŭ almenaŭ la grandegan plimulton de la personoj, kiuj batalas por Esperanto, ligas unu komuna ideo, kiu estas la tuta stimulo de ilia laborado.

Ĉiu privata Esperantisto povas havi tiajn konvinkojn aŭ fari tiajn agojn, kiajn li volas, kaj ni ne respondas por liaj konvinkoj nek agoj, kiel li ne respondas por niaj. Li povas esti la plej granda egoisto, genta ŝovinisto, malamanto de homoj aŭ eĉ la plej malnobla krimulo, kaj se li nur uzas la lingvon Esperanto, ni ne povas malpermesi al li nqmi sin esperantisto. Sed se li volas veni al esperantista Kongreso, aŭ se li volas aliĝi al ia alia institucio, kiu portas la verdan standardon, tiam la afero ŝanĝiĝas. Tiam li venas en landon, kiu havas siajn apartajn leĝojn, siajn apartajn morojn kaj principojn.

En Esperantujo regas ne sole la lingvo Esperanto, sed ankaŭ la interna ideo de la esperantismo; en Esperantujo regas ne sole la oficiala ĝenerala esperantismo, — tie regas ankaŭ io alia, io ĝis nun ankoraŭ ne precize formulita, sed tre bone sentata de ĉiuj esperantuanoj — tie regas la verda standardo!

Kio estas la verda standardo? Se por iu komercisto, kiu uzas Esperanton nur por vendi siajn komercaĵojn, aŭ por iu sportisto, kiu uzas Esperanton nur por amuziĝi, nia standardo estas simpla signo de nia lingvo, simpla interkonsentita dekoracio por niaj kongresoj kaj institucioj — ni, Esperantistoj-batalantoj, certe vidas en nia standardo ion alian: ĝi estas por ni io sankta, ĝi estas la signo, sub kiu ni marŝas al nia paca batalado, ĝi estas la voĉo, kiu konstante memorigas al ni, ke ni laboras por Esperanto nur tial, ĉar ni esperas, ke pli aŭ malpli frue, eble post multaj jarcentoj,

Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.

— (Aplauĉo.) Ni konstante ripetadis, ke ni tute ne deziras nin enmiksi en la internan vivon de la gentoj, sed ni deziras nur krei ligantan ponton inter

la gentoj. La devizo de la ideoj Esperantistoj, neniam ĝis nun precize formulita, sed ĉiam klare sentata, estas: „Ni deziras krei neŭtralan fundamenton, sur kiu la diversaj homaj gentoj povas pace kaj frate interkomunikiĝadi, ne altrudante al si reciproke siajn gentajn apartaĵojn.“

Tia, laŭ mia opinio, estas la devizo de la verda standardo, de tiu bela kaj majesta standardo, kiu kunvokas nin ĉiujare el ĉiuj partoj de la mondo en la nomo de la plej bela revo de la homaro.

Por formuli precize ĉiujn detalojn de la dirita devizo, ne venis ankoraŭ la tempo; ili formuliĝos per si mem, iom post iom, per nia ĉiujara kunvenado kaj kunvivado. Mi volis nur atentigi vin, ke niaj kongresoj, farataj sub la signo de la verda standardo, estas ne sole kongresoj de la lingvo Esperanto, sed ankaŭ de la interna ideo de la esperantismo. Sekve ĉiu temo, en kiu ni sentas spiriton de la verda standardo, ĉio kio kondukas al rompado de la muroj inter la gentoj, apartenas al nia kongreso.

Vi ofte aŭdis pri la neŭtraleco de niaj kongresoj. Jes, neŭtraleco estas la ĉefa principo de niaj kongresoj; sed oni devas ĝuste kompreni la sencanon de tiu ĉi neŭtraleco. Neŭtraleco ekzistas en ĉiuj internaciaj kongresoj; sed dum tie la neŭtraleco estas simple afero de fakto, ĉe ni ĝi estas la ĉefa principo, ĉe ni la neŭtraleco, aŭ pli ĝuste la neŭtraligo de la intergentaj rilatoj estas la tuta enhavo, la tuta celo de niaj laboroj. Tial ni neniam devas paroli en niaj kongresoj pri aferoj speciale politikaj, kiuj apartenas al la diplomatoj, aŭ pri aferoj speciale religiaj, kiuj apartenas al la ekleziuloj kaj filozofoj, — ĉar la verda standardo malpermesas al ni fari ion, kio povus ofendi tiun aŭ alian genton aŭ religian grupon; sed ĉio, kio, neniu ofendante, povas krei pacan ponton inter la popoloj, tio ne sole ne devas esti timeme evitata en niaj kongresoj, sed kontraŭe, ĝi devas esti ĝuste la esenco de niaj kongresoj, ĉar ĝi apartenas al la verda standardo.

Se ni memoros pri la postuloj de la verda standardo, tiam ni ne timos plu paroli kaj agi, tiam ni irados al nia celo konscie kaj kuraĝe kaj niaj kongresoj fariĝos kun ĉiu jaro pli interesaj kaj pli gravaj por la mondo. La verda stelo ĉesos esti malkuraĝa signo de silento, ĝi fariĝos signo de laboro.

Ĉio, kio kondukas al rompado de la muroj inter la gentoj, apartenas al nia kongreso. Vastaj kaj grandaj estas la rilatoj inter la gentoj kaj nacioj, kaj vastaj kaj multenombraj estas la temoj, kiujn ni devos pridiskutadi. Tiel ekzemple, havante nenian intencon enmiksi sin en ian specialan sistemon pri tiu aŭ alia temo, oni povas proponi al niaj kongresoj internaciajn sistemojn por la oportuno kaj neŭtraleco de la rilatoj inter-

naciaj, kiel ekzemple internacian mon-sistemon, horsistemon, kalendaron, k. t. p., kaj tiam ni povos esplori, ĉu la propono estas bona aŭ ne, sed ni ne devas diri, ke la diskutado pri tiuj projektoj estas kontraŭa al nia programo. Oni eble ankaŭ proponos al ni la aranĝon de kelkaj festoj intergentaj, kiuj ekzistus paralele kun la specialaj festoj de ĉia gento kaj eklezio kaj servus por frate ligi inter si la popolojn; oni proponos ankaŭ aliajn similajn aferojn. Ne venis ankoraŭ la tempo, por paroli pri ĉio detale, tial pardonu min, ke mi nur aludas per kelkaj vortetoj tion, pri kio mi volus multe, tre multe paroli kun vi; sed ĉiam pli kaj pli, komencante de aferoj bagatelaj kaj transirante al aferoj plej gravaj, komencante de aferoj pure materialaj kaj transirante al ĉiuj flankoj de la homa spirito kaj moralo, oni proponados al ni diversajn rimedojn, kiuj servas al la frutigado de la homoj kaj al la rompado de la muroj inter la gentoj — kaj ĉion tion ĉi ni povos prijuĝi, akcepti, aŭ ne akcepti, sed ni neniam devos ĝin blinde forĵeti antaŭe. Ĉar ĉio, kio servas al la frutigado de la gentoj kaj al la rompado de la malamikaj muroj inter la popoloj — se ĝi nur ne enmiksas sin en la internan vivon de la gentoj — apartenas al la verda standardo. (Aplaŭdo.)

Karaj amikoj! Mi klarigis al vi, kio — laŭ mia opinio — devas esti la celado de niaj kongresoj. Dum ĉiu privata Esperantisto povas kontentiĝi per tio, ke li uzas la lingvon Esperanto, niaj kongresoj — laŭ mia opinio — devas labori ne sole por la lingvo, sed ankaŭ por la interna ideo de la esperantismo. Mi ripetos, ke tio ĉi estas mia privata opinio, kiun mi tute ne volas proponi al vi kiel ian oficialan programon por niaj kongresoj. Nia kongreso devas esti simple kongreso de Esperantistoj, kaj kondiĉe ke ĝia programo estu preparita laŭ la kongresa regularo, ĝi devas resti tute libera kaj konformiĝi ĉiujfoje al la opinioj kaj deziroj de la plimulto de la kongresanoj. Sed ĉu vi aprobas mian opinion aŭ ne, ĉu vi volos labori laŭ la postuloj de la verda standardo aŭ ne — mi ne dubas, ke en la profundeco de viaj koroj vi ĉiuj sentas la verdan standardon, vi ĉiuj sentas, ke ĝi estas io pli, ol simpla signo de lingvo. Kaj ju pli ni partoprenados en niaj ĉiujaraj kongresoj, des pli ni interfratiĝos kaj des pli la principoj de la verda standardo penetros en nian animon. Multaj personoj, aliĝas al la esperantismo pro simpla scivoleco, pro sporto, aŭ eble eĉ pro atendata profito; sed de la momento, kiam ili faras la unuan viziton en Esperantujo, ili malgraŭ sia propra volo ĉiam pli kaj pli entiriĝas kaj submetiĝas al la leĝoj de tiu lando. Iom post iom Esperantujo fariĝos edukejo de la estonta interfratigita homaro, kaj en tio ĉi konsistos la plej gravaj meritoj de niaj kongresoj. (Aplaŭdo.)

Vivu Esperanto, sed antaŭ ĉio vivu la celo kaj la interna ideo de la esper-

antismo, vivu la frateco de la popoloj, vivu ĉio, kio rompas la murojn inter la gentoj, vivu, kresku kaj floru la verda standardo! (Aplaŭdado.)



LA TRIA UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO

en Cambridge. Aug. 12—17 1907.

Jam pasis la Tria. La semajno esperantista en Cambridge finiĝis. Ekmigris ree en la mondon la verda stelo, post kelktaga haltado super la famekonata urbeto. Iradante sur la ĉiela firmamento ĝi denove travagos la mondon; en ĉiuj lokoj ĝi vekos la dormantojn; per novaj pruvoj ĝi ree raportos pri la granda sukceso de nia afero; pri la nekontraŭstarebleco en kiu la Esperantismo progresadas kaj per kiu ĝi almitas al si la mondon. Ree kaj ree novaj amasoj da sindonaj batalantoj kolektiĝas sub la verda standardo; pli kaj pli densiĝas la vicoj de nia paca armeo.

Dume la stelo sian vojon daŭrigas. En la jaro 1908 ĝi iros Germanujon. Kaj fariĝos la loko, super kiu la stelo haltadas, kvazaŭ meza punkto de grandega araneaĵo, al kiu el ĉiuj partoj de la mondo vojaĝantoj siajn paŝojn direktas. Miloj da homoj la venontan jaron certe alvenos Germanujon. Feliĉaj vi germanaj samideanoj! Nun estas vico via akcepti la tutmondan amikaron. La kvara familia festo de l'homaro okazos en via lando. Sukceson al vi!

Sed ni reiru Cambridge-on. Kiel ofte ni ne aŭdis esprimita, precipe tie ĉi en nia lando, la opinion ke la angloj neniam akceptos nian lingvon. La ilia ja fariĝos tutmonda. Antaŭ nelonge eĉ konata finna historiskribanto tion insistis en publika revuo. Li certigis, ke la monda helpa lingvo devas esti vivanta, artefarita neniam sukcesos. Ni nur povas bedaŭri, ke li ne ekkoniĝis kun Esperanto, antaŭ ol li ĝin kondamnis.

Kaj nun, ĵus en Anglujo okazis la Tria Kongreso. Ĝia sukceso estis grandioza. Kiel oni ja povis antaŭvidi, ĉar la organizado de la kongreso estis konfidita al tiel lertaj, sindonaj batalantoj, kiel niaj anglaj samideanoj. Ĉio estis mirinde bone preparita. Grandan dankon ŝuldas la esperantistaro al la „Trio por la Tria“, al S:ro Kolonelo Pollen, S:ro D:ro Cunningham kaj S:ro Bollingbroke Mudie, kiuj dum unu longa

jaro tiel sentime kaj senlace faris gigantajn klopodojn por ke la Tria fariĝu glora epoko en la historio de nia afero.

El ĉirkaŭ 30 diversaj landoj estis alvenintaj pli ol 1600 homoj. Kia miraklo! Tiel multe da malsamlingvuloj kunvenintaj en unu loko kaj ĉiuj reciproke interkompreniĝis senpene. Esperanto iliajn korojn alproksimigis unu al la alia. Rimarkinda ankaŭ estas ke el la paca-konferenco en Haag S:ro A. H. Fried sendis la jenan telegramon: „De la nepaca konferenco en Haag korajn salutojn al la vere paca konferenco en Cambridge“.

kaj S:ro Stead sendis la jenan leteron al S:ro D:ro Cunningham:

„Mi gratulas vin ke vi havas la honoron akcepti D:ron Zamenhof kaj la Esperantistan Kongreson en la fama Universitato de Cambridge. Mi, ho ve! devas resti por ĉeesti en alia Kongreso, kiu estus multe pli interesa kaj utila se ĝiaj anoj parolus Esperanton. Ju pli mi vidas internaciajn konferencojn, des pli konvinkita mi iĝas, ke D:ro Zamenhof, kreante Esperanton, liveris la solan nepran bezonataĵon por la Federacio de l'Mondo, simplan, regulan, neŭtralan ŝlosilo-lingvon, kapablan esti universale alprenata. Antaŭ la fino de la jarcento Esperanto estos universale rekonata kiel necesajo por la civilizita homaro.

Volu doni al D:ro Zamenhof mian dankan respekton kaj salutu lin de mi kiel unu el la grandaj bonfarantoj de l'homaro. Mi estas, via sincera William T. Stead.“

Sendube neniu povos sukcese kontraŭdiri la supre cititajn sinjorojn.


La tuta fizionomio de l'urbeto esperantiĝis dum tiuj ĉi tagoj. La stacidomo, Urbodomo kaj aliaj konstruaĵoj estis bele ornamitaj per flagoj, esperantaj kaj diversnaciaj. Multaj vendejoj kaj magazenoj anoncis en siaj fenestroj: „Oni parolas Esperanton tie ĉi“. Eĉ la policanoj parolis nian lingvon.

En la Urbodomo troviĝis la oficiala kongresoficejo, kie oni post alveno povis ŝanĝi la provizoran bileton kontraŭ paketo, entenanta manĝokuponaron, kongresbileton, programojn kaj ruband devizojn (ruĝblublankajn por la britoj kaj palbluajn por eksterlandanoj). Tie ankaŭ troviĝis la kongresa poŝtoficejo. Kaj en la granda salono de l'Urbodomo okazis la agadaj kunsidoj de la kongreso.

La antaŭkongresaj tagoj.

Jam sabaton la 10:an la plej multaj kongresanoj estis alvenintaj Cambridge'on kaj tiam per speciala festo en la Urbodomo komenciĝis la amuzaĵoj. Tiu ĉi sukcesplena koncerto estis aranĝita de la „Esperantista Vagabonda Klubo“, kies membroj mem plenumis preskaŭ ĉiujn erojn de l'programo. Inter la kantintoj kaj deklamintoj estis ankaŭ du blindaj studentoj el „Perkins Institution“ en Boston. La aŭdantaro per bruega aplaŭdado ŝatis la prezentadon.

La sekvantan tagon, dimanĉon matene okazis en la Romkatolika preĝejo speciale farita meso. La predikon faris Abato Richardson el Bruselo, fondante ĝin sur la teksto el la Evangelio Sankta Johano, ĉap. 10:a verso 16:a: „Unu ŝafejo kaj unu paŝtisto“. Li ankaŭ antaŭlegis la jenan telegramon el Vati-



D:ro G. Cunningham. S:ro H. B. Mudie Kolonelo J. Pollen.

kano: „Sankta Patro permesas Richardson doni lianome papan benon post prediko, Katolika Diservo, nur se Episkopo konsentas Reskripta letero sekvas. Giambene“, kiu ĝoje estis aŭdata.

La saman matenon okazis en la preĝejo „Great St. Mary's“ la unua plena protestanta Diservo en Esperanto. Pli ol mil homoj ĉeestis. Pastro J. C. Rust el Soham faris la predikon kaj fondis ĝin sur la vortoj el Epistolo al la Efesanoj, ĉap. 1:a verso 9:a: „Sciiginte al ni la misteron de Sia volo, laŭ la amoplena celo, kiun Li proponis al Si, per nova ordo en la pleneco de la tempoj sume kunigi ĉion en Kristo“. Tiun ĉi atentindan predikon ni laŭvorte enpresos en la 8:an numeron de „F. E.“

Posttagmeze estis aranĝita vizito en la bela botanika ĝardeno.

Okazis ankaŭ la unua specialista kunveno, nome de la interesatoj pri la traduko de la Sankta Biblio en Esper-

anto. Ĉeestis proksimume 200 personoj. Pastro J. C. Rust prezidis. La celo de la diskutado estis: 1:e Sciigi pri la provoj jam faritaj; 2:e Pridiskuti la plej bonan rimedon por ricevi vere internacian tradukon; 3:e Studi la rimedojn por eldoni tian tradukon. Pastro A. J. Edmonds legis raporton pri la jamaj tradukoj. Laŭ propono de la prezidanto estis decidita fondi centran organizan komitaton kaj kiel ĝiajn anojn oni elektis: Pastron J. C. Rust (Anglujo), Pastron Schneeberger (Svisujo), kaj Abaton Pel-tier (Francujo). Por faciligi la laboron de la komitato S:ro Evstifeiff (Rusujo) proponis ke estu fondata speciala organo por interŝanĝo de ideoj kaj diskonigo de la rezultatoj atingitaj kaj li afable promesis preni sur sin la eldonadon.

Vespere okazis ankoraŭ Diservo en Esperanto en la Kongregacia Kapelo. La predikon faris Pastro W. B. Selbie kaj fondis ĝin sur la vortoj el Sankta Johano, ĉap. 7:a verso 17:a: „Se iu homo volegas fari lian volon, li ja scios pri la prediko, ĉu ĝi estas el Dio aŭ ĉu mi parolas el mi mem.“ Notinde estas, ke Pastro Selbie estas nur kvinsemajna esperantisto. Jen nova pruvo pri la mirinda facileco de nia lingvo.

Alveno kaj oficiala akcepto en Cambridge.

La plej grava tago de la Kongreso estis lundo la 12.a.

Matene la diversaj nacioj aparte kunsidis por delegi siajn oficialajn reprezentantojn; po unu por ĉiu nacio.

Kaj posttagmeze je la 2:a horo alvenis „la Reĝo de Esperanto“. La anglaj gazetoj certigas ke la alveno de D:ro Zamenhof kreigis preskaŭ tiom da intereso kiom la alveno de membro de la reĝa familio,

En la stacidomo atendis la vagonaron grupo da eminentuloj el Anglujo, Kontinento kaj Ameriko, la Urbestro kaj tuta urbestro portante siajn oficialajn vastaĵojn kaj ornamaĵojn. Ĉirkaŭ ili granda nombro da esperantistoj kaj fine sennombra aro da urbanoj. Vere pentrinda vidaĵo. Sur la marŝejo, kovrita per tapiŝoj, atendis la urba muzikistaro kaj kiam, malrapide, solene eniras la vagonaro, eksonis tonoj de „Sub la duobla Aglo“, Austruja Marŝo kaj fine „Rigardu! La Heroo alvenas“. Miloj da buŝoj esperantistaj ekkriegas: Vivu Zamenhof! vivu la majstro! vivu! hurra!

cheer!" Ĉapelojn, tukojn, verdajn standardojn oni svingas en la aero; kia entuziasmo! ne estas eble ĝin vorte priskribi.

Kaj de la vagono malsupreniras la Majstro. Lian vizaĝon briligas la varmeco de la salutado; li ridetas kiam, akompanata de D:ro Cunningham kaj kolonelo Pollen kaj sekvata de S:ro Micheaux kaj S:rino Zamenhof kaj Bulonjaj kaj Londonaj esperantistoj, li iras kelkajn paŝojn antaŭen al loko kie lin akceptis la urbestro premante lian manon kaj solene dirante bonvenon al li. La urbestranoj ankaŭ estis prezentataj al nia kara majstro kaj dum senĉesaj „vivu'oj" li eliris el la stacidomo al sia kaleŝo. En la korto lin atendis honora gvardio el la „Legion of Frontiersmen", areto da medal-ornamitaj veteranoj komandataj de kapitano Heale.

Ekkomencis vere triumfa procesio al la „Fitzwilliam Muzeo". Antaŭirata de policaj rajdistoj kaj sekvata de la honora gvardio la procesio traveturis la stratojn sur kies ambaŭ flankoj amasiĝis densaj vicoj da Esperantistoj el ĉiuj mondpartoj. Senĉesaj krioj „Vivu Zamenhof" ĉie salutis la Majstron kaj en tiun senroman entuziasmon sin miksis la bronzaĵ voĉoj de la sonorilegoj de ĉiuj preĝejoj de l'urbo, donante ankoraŭ pli da soleneco al tiuj neforgeseblaj momentoj.

En la „Fitzwilliam Muzeo" la vic-kanceliero de la Universitato, Rev. E. S. Roberts akceptis kaj afable salutis D:ron Zamenhof. Tuj poste antaŭiris junuleto kaj donante florojn al S:rino Zamenhof, prezentis al ŝi la saluton kaj bodeziron de la junularo Cambridge'a.

Starante ĉe la supro de l'ŝtuparo la Majstro nun, afable premis la manojn al ĉiuj kongresanoj, kiuj en longa vico preterpasas antaŭ li. Dume estis kantata la internacia himno „L'Espero".

Post tiu solena akto la kongresanoj kolektiĝis en Neville's Court, Trinity College, kie ili estis fotografataj. Pro la granda nombro de la kongresanoj oni tamen ne povis kunmeti ĉiujn en unu grupon, sed devis ilin dividi sur du fotografajojn.

Disiĝis ree la nelacigeblaj kongresanoj por pretiĝi al la solena.

Malferma Kunsido en La Nova Teatro.

Je la 8:a horo vespere rapide pleniĝis la nova teatro. Gajaj homoj el multnombraj malsamaj gentoj, ĉiuj entuziasme babilante en unu stranga lingvo, nia kara Esperanto.

„La okazintaĵo estas neforgesebla. Vidante tiun modestan viron, ĉirkaŭitan de preskaŭ mil kvin cent homoj, kantantaj kaj akklamantaj en lingvo elpensita de li, oni nature memoras pri la malgranda semo kiu igas miloj da pluaj semoj. Kia triumfo post dudek jaroj da batalado." („Cambr. Daily News")

La kurteno leviĝis kaj en la scenejo aperis ĥoro da 60 sinjorinoj, feste vestitaj, organizita de s:ro A. Tuffield. Kaj dum majstro direktado de s:ro C. B. Rootham ili kantis nian himnon „La Espero".

Duan fojon leviĝis la kurteno. Ĉe granda verde kovrita tablo sidis la Majstro kaj lia edzino kaj dekstre la Urbestro kaj lia edzino kaj s:ro Mudie, maldekstre kolonelo Pollen kaj d:ro Cunningham. Flanke kaj malantaŭe la aliaj eminentuloj kaj la delegitoj. Vidajo neforgesebla. Per longa, entuziasma aplaŭdado la ĉeestantoj esprimis sian admiron al la glora elpensinto de la lingvo Esperanto.

Pastro Schneeberger, el Svisujo, malfermis la kunsidon kaj transdonis la prezidantecon al kolonelo Pollen. Kiel vicprezidantojn oni elektis s:ron Bolingbroke Mudie kaj d:ron Cunningham.

La Urbestro s:ro G. Stace leviĝis kaj en Esperanto faris bonvenan paroladon al d:ro Zamenhof. Je la nomo de la urba estraro li kore akceptis la kongresanojn kaj esperis ke la kongreso estos granda sukceso. La Urbestredzino, ankaŭ en Esp., afable salutis la esperantistinojn.

En la nomo de la Brita Esperantistaro kolonelo Pollen prezentis al la Majstro belan blazon-standardon. Farita el dika verda silko, en ĝia mezo troviĝas argenta stelo ĉirkaŭata de ruĝaj festonoj, sur kiuj la nomoj de la kongresurboj estos broditaj. Oni tie jam legis la nomojn: Boulogne, Geneve, Cambridge. En la nomo de la tuta Esperantistaro d:ro Zamenhof akceptis ĝin kaj esprimis deziron, ke ĝi ĉiam restos la simbolo de l'espero.

Ree leviĝis D:ro Zamenhof, ia honora prezidanto de l'kongreso, por legi sian paroladon. Per preskaŭ senspira silento ĝi estis aŭskultata, iam post iam nur interrompita per aplaŭdegoj kaj post liaj lastaj vortoj „vivu, kresku kaj floru la verda standardo" sekvis longa entuziasma ovacio.

Poste S:ro Gaston Moch, ĝenerala sekretario, prezentis la telegramojn kaj leterojn ricevitaĵojn. Pro ilia granda nombro li tamen ne povis ilin ĉiujn

legi, nur la nomoj de la sendintoj estis cititaj. Eĉ de lokoj tiel malproksimaj kiel Wladivostok, Hindujo, Nov-Zelando, Nord- kaj Sud-Ameriko estis salutoj alvenintaj.

Sekvis la paroladoj de la naciaj delegitoj. Unu post la alia ili leviĝis kaj prezentis la saluton de siaj samlandanoj al D:ro Zamenhof kaj la kongreso.

Unue parolis la *oficiala reprezentanto* de la Belga registaro S:ro Leŭtenanto Cardinal. La Ministro de Milito de lia lando, lin sendis al la kongreso por fari raporton pri ĝi kaj poste paroladi en la militistaj lernejoj. Jen fakto grava, kaj ni esperu ke la estontajn kongresojn ĉeestos ĉiam pli kaj pli kreskanta nombro da tiaj oficialaj delegitoj.

Jen la nomoj de la aliaj parolantoj:

Tuniso, S:ro Gelula; *Svisujo*, S:ro A. Waltisbuhl; *Svedujo*, S:ro P. Ahlberg; *Siberio*, S:ro R. Frenkel; *Rusujo*, S:ro N. P. Evstifeieff; *Polujo*, S:ro K. Bein (Kabe); *Venezuelo*, S:ro Hector Volcan (knabo 13¹/₂ jara); *Urugvajo*, S:ro Munos; *Malto*, S:ro D. H. Lambert; *Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko*, Profesoro F. B. Viles; *Italujo*, S:ro Junck; *Islando*, S:ro Thorsteinsson; *Irlando*, S:ro E. E. Fournier d'Albe; *Holando*, S:ro Uitterdick; *Katalunujo*, S:ro Pujula y Valles; *Hispanujo*, Pastro Guinart (kiu esprimis la deziron ke en Hispanujo okazu la sekvanta Kongreso); *Gibraltaro*, S:ro C. J. Edwards; *Germanujo*, D:ro Mybs; *Francujo kaj Brazilo*, Markizo L. de Beaufront; *Danujo*, S:ro Boebel; *Anglujo*, S:ro J. Rhodes; *Skollando*, S:ro J. M. Warden; *Belgujo*, S:roj Van de Bieste kaj Blanche; *Aŭstrujo*, S:ro O. Simon; *Bohemujo*, S:ro T. Ĉejka; *Kanado*, S:ro A. P. Beauchemin.

Oni decidis sendi salutan telegramon al la Reĝo de la Belgoj kaj ankaŭ al lia Reĝa Moŝto Eduardo VII, kiu de sia privata sekretario, Sir Knollys, sendigis afablan respondon al la kongreso.

La kunsido finiĝis per kantado de la angla himno „Savu la reĝon Di".

La Agadaj Kunsidoj.

Mardon, je la 10:a matene, okazis la 1:a agada kunsido de la kongreso. Sur la estrado sidis D:ro Zamenhof, la Trio kaj la diversnaciaj delegitoj. En la malantaŭo ia nova blazonstandardo estis starigita. S:ro Mudie majstre prezidis kaj la oficialan protokolon faris S:roj G. Moch kaj G. Chavet, helpataj de franca fraŭlino, kiu per stenografmaŝino facile kaj rapide notis la paroladojn.

Unue estis legata raporto de la Konstanta Komitato, en kiu estis citita la regularo por la kondukado de estontaj kongresoj.

La sekretario de la Centra Oficejo, S:ro Chavet, legis raporton pri la grandegaj progresoj de Esperanto dum la tempo, pasinta de la lasta kongreso. En ĉiujn mondpartojn nia lingvo disvastiĝis kaj precipe en Ameriko ĝi rapide progresadis.

La Redaktoro de „Tra la Mondo“, S:ro K:no Montrosier legis raporton, faritan de leŭtenanto Bayol, pri la stato de Esperanto ĉe la Ruĝa Kruco. En ĉiuj landoj la Ruĝkrucaj sukcese propagandas la lingvon.

S:ro René Deshayes (Francujo) atentigis pri la graveco de Esperanto por la internaciaj rilatoj de la socialistoj. Li plendis, ke la lingvo inter ili ankoraŭ ne ricevis tiom da atento, kiom ĝi meritas.

Profesoro Grillon (Ameriko) parolis pri la progresado de Esperanto en lia lando. Dum la pasinta jaro la nombro de la societoj esperantistaj kreskis de 3—4 ĝis 65. En Seattle estas fondota lernejo por instruado de fremdaj lingvoj per Esperanto. Li esperas prui ke la lernado de fremda lingvo post tiu de Esperanto ne estos pli longa, ol la lernado de fremda lingvo sola.

Sciigita estis, ke ĉe la armeo en Bulgarujo la portado de la verda stelo estis malpermesata antaŭ du jaroj, sed jam Lia Princa Moŝto Ferdinando donis sian konsenton.

S:ro Mudie sciigis, ke la nombro de la kongresanoj enskribitaj estis 1399 sed al tiu nombro oni devas aldoni la multajn personojn, kiuj, povante resti en la urbo nur kelkajn tagojn, ne oficiale registriĝis.

S:ro Frenkel (Siberujo) prave rimarkis ke la lernejoj subtenas, ne la registaroj, sed la gepatroj de l'lernantoj. Por enkonduki Esperanton en la lernejoj oni tial devas konvinki la gepatrojn kaj instigi ilin ĝin postuli en la instruajn programojn.

Merkredon je la 10:a la dua agada kunsido. La famekonata profesoro de la latina lingvo ĉe la Cambridge'a Universitato, D:ro Mayor, kiu, kvankam 83 jara, ne timis eklerni nian lingvon, diris kelkajn favorajn vortojn por Esperanto. Citinte la vortojn de Charles Lamb: „Oni ne povas samtempe koni kaj malami ian homon“, li diris, ke reciproka nekoneco inter la homoj estas la radika malbonaĵo, kiu kreskigas malamon, kaj

sekve ĉiu rimedo, kiu celas malaperigi tiun nekonecon, estas ago de amo. Universala lingvo estas tia rimedo, sed ĝi devas esti dua aŭ helpa lingvo kaj ne celi subpremi la naciajn lingvojn, ĉar ĝiaj sekvoj en tiu lasta okazo estus detruaj. D:ro Zamenhof kreis, ne regantan sed helpan lingvon.

Sekvis diskuto pri la elekto de ĉiujara festatago de Esperanto. S:ro Simon (Aŭstrujo) enkondukis la demandon, aludante la fakton ke en ĉiuj landoj la 20:a jubileo estis solenita. Li proponis la naskiĝo tagon de D:ro Zamenhof. S:ro Moch opiniis, ke unu sola tago ne estus egale oportuna por ĉiuj nacioj. D:ro Zamenhof mem estas principe favora al la demando, fine la kongreso decidis principe akcepti tiun feston, sed la tago estos poste decidata.

La Kongreso aprobis la kreon de „Esperantista Marista Ligo“ kaj direktis al la havenaj grupoj insistan admonon, helpi kaj subteni la agadon de la ligo.

Faŭdon, en la tria agada kunsido S:ro Evst:feieff (Rusujo) diris kelkajn vortojn pri la granda vortarego Franca-Esperanto kaj admonis la kongresanojn ĝin aboni kaj diskonigi kiel eble plej vaste.

S:ro Schroder (Aŭstrujo) anoncas la preparadon de internacia kalendaro por la jaro 1908.

S:ro Ahlberg raportis pri la progresoj en Svedujo kaj la propagando inter la blinduloj. Profesoro Cart parolis pri la stato de Esperanto inter la blinduloj. Unu ĉeestanta blinda esperantisto stariĝis kaj kore dankis ĉiujn blindhelpantojn.

S:ro E. K. Harvey (Perkins Institute for the Blind, Boston) atestas, ke laŭ lia sperto dum la kongreso, Esperanto estas tute taŭga kiel komprenilo inter alilandanoj. Je l'onomo de la Amerikana Esp. Societo li proponis ke la tuta „Ekzerkaro“ estu metata sur fonografajn cilindrojn, kiuj estos uzataj kiel instruiloj. La propono estis aprokata kaj S:ro Mudie promesis ĝin rekomendi al la Centra Oficejo. Fine li legis leteron de l'ĉefredaktoro de la gazeto „North American Review“, kiu invitis la kongreson en la jaro 1908 al Ameriko. Tuj poste D:ro Mybs, la prezidanto de l'„Germana Esp. Societo“, sciigis, ke la germanaj esperantistoj ĵus en aparta kunsido decidis inviti la 4:an kongreson al Germanujo. La invito estis kore akceptata sed la decidon oni prokrastis ĝis la morgaŭa tago.

Diversajj temojn ankoraŭ pritraktis aliaj parolantoj.

Vendredon matene je la 10:a okazis la kvara kaj lasta agada kunsido de l'kongreso. La ĉefa rezultato de l'diskutado estis akcepto de Germanujo kiel kongreslando en la jaro 1908. S:ro D:ro Mybs dankas per koraj vortoj pro tiu ĉi decido, kaj promesas en la nomo de la germanaj esperantistoj, ke ili aranĝos la kongreson kiel eble plej bone, por ke ĝi estu inda je la antaŭaj kongresoj. La kongreso ankaŭ esprimis sian dankon al la Amerikanoj pro ilia invito.

S:ro G. Moch opiniis, ke estas dezirinde, ke post la germana kongreso, dua kongreso okazus en Ameriko, kiun povus ĉeesti la reprezentantoj de la amerikaj nacioj kaj nur delegitoj el Eŭropo. S:ro Mudie ankaŭ priparolis la eblecon kaj utilecon de du kongresoj ĉiujare. La propono estis favore akceptata, sed definitivan decidon oni ne faris.

Meze de longa aplaŭdado Kolonelo Pollen sciigis ke la fama eksgeneralsimo de la brita armeo, Lord Roberts, konsentis fariĝi honora prezidanto de la Brita Esperantista Societo.

(Daŭr.)




ESPERANTO en FINN- LANDO.

Antaŭ nelonge ni ricevis la 1:an numeron de nova gazeteto en Esperanto: „La Stelo“ organo de la Esperanta klubo „L'Espero“ en Borgå (Porvoo). Manuskribita kaj presita per hektografilo la 4-paĝa gazeto enhavas redakciajn artikolon kaj kelkajn bone tradukitajn rakontetojn de i. a. tiel famaj aŭtoroj kiel H. Sienkiewicz kaj V. v. Heidenstam. Kaj ĉar ĝin redaktadas tiel sindonaj kaj lertaj samideanoj kiel ni scias ke estas niaj junaj amikoj en Borgå, ni estas konvinkitaj pri tio ke „La Stelo“ ĉiam sindone batalados „sub la sankta signo de l'espero“ kaj ke sub ĝia kondukado nia afero rapide progresados ankaŭ en la urbeto, kie vivadis kaj mortis nia granda nacia poeto Runeberg.

„Finna Esperantisto“ kore salutas sian novan kunfraton kaj kunbatalanton kaj sincere deziras al ĝi bonan sukceson kaj longan vivadon.

ASomo.



„MONPUNO.“

Legantoj, vi certe ekmiras la strangan surskribon „Monpuno“. Ĉu la redakcio intencas nin kondamni al monpunoj? Jen, la klarigo! La 24-an de Julio ni ricevis el Svisujo, Ĝenevo, leteron, kies verkinto inter alie skribas: „— — — — — Mi estas konvinkita, — — — — ke (via) afero — — — — plifortiĝos, kreskos, — — — — kaj estos tiel same bela, kiel tiuj finnaj eldonoj, kiujn mi vidis antaŭe dank al afableco interalie de samideano S:ro Gustafsson. Tio estis antaŭ multaj jaroj, li eble forgesis tion, sed mi ĝis nun ne sole konservis dankan senton, sed krom tio iun alian senton, pli malagraban — — —, ĉar fine mi restis ŝulda al li — — — —“.

Nun mi estas feliĉa kaj duoble dankema al li, ĉar tio donas al mi plej rajtan pretekston peti Vin akcepti aldonojn al tiu ĉi letero Cent (100) frankojn, ne kiel „malavaran donacon“, sed kiel merititan de mi kaj nur okaze prokrastitan monpunon. — — — — Por mi, mi petas nur favoron: bonvolu sendi al mi ĉiujn eldonojn pri Esperanto en finna lingvo, kiuj ĝis nun aperis kaj enskribi min kiel abonanton por Via delonge atendita „Finna Esperantisto“.

La redakcio do, ricevis de nekonata al ĝi amiko, S:ro N. P. Evstifeieff, grandan monsumon por alsendo de niaj kelkaj finlingvaj verkoj esperantaj, la estantaj kaj estontaj. Certigitaj, ke nia bona amiko kaj samideano ne deziras laŭdegojn en „F. E.“ ni tamen volas konfesi al S:ro Evstifeieff ke lia boneco nin tiel surprizis, ke ni eĉ ne povas trovi decajn esprimojn por niaj sentoj por li. Ekmiro, dankemo, sento de kompleta nemeritinteco plenumas nian koron.

La monsumon ni komunikis al administracio de „Ilarejo Esperantista“, kiu eldonas nian gazeton kaj en ne malproksima estonteco plej kredeble ankaŭ eldonos finna-esperantan vortaron.

Red.



BIBLIOGRAFIO.

Kian ajn opinion oni havas pri valoro de religia literaturo por si mem, ĉiuokaze oni devas konstati la fakton, ke tia literaturo havis kaj havas grandegan signifon rilate al disvolviĝo de tre mul-

taj naciaj lingvoj. La Biblio estas ĉe ĉiuj civilizitaj pololoj unu el la ĉefverkoj de ilia literaturo, ofte, kiel ekzemple ĉe ni finnoj, ĝi tion fondis. Ne atente ĝian spiritan rolon ĝi jam kiel lingva dokumento pro simpleco de prezentado unupartaj kaj viveco de tiu aliparte ĉiam restas rimarkinda.

Estas do facile komprenebla ke alproprigo de la biblio al esperantismo jam de longe estas atendita, des pli fervore, ĉar esperantigita Biblio estus tre oportuna helpilo ĉe studado de Esperanto. Kaj de diversaj flankoj oni ankaŭ sciigis, ke partoj de la biblio estis en esperantigado. Tamen ne pli frue ol la lastan jaron oni ricevis la unuan frukton de tiuj laboroj: tiam aperis:

„La Evangelio Sankta Mateo“, tradukita de W. B. Mielck kaj Fr. Stephan. Kun kontento oni povas konstati, ke la tradukado ĝenerale estas flua kaj bone prosperinta: tre malofte oni trovas esprimojn, kiuj eble povus esti plibonigitaj. Preserarojn oni trovas preskaŭ tro ofte kaj la subskribanto ankaŭ ne povas aprobi tion, ke la supersigno de „u“ ĉiam estas forlasita; tio povas kaŭzi, ke noveloj elparolas kaj ellernas malkorekte respektivajn vortojn. Ĉar la tradukado estas farita el la germana lingvo, ĝi ne povas havi la kiom eble plej grandan precizecon. Kiel teksta provaĵo estu cititaj la jenaj frazoj, ne tial, ke ili estas aparte karakterizaj al la tradukado, sed ĉar eble esperantistoj ion je ili povas lerni. „Vi estas la salo de la tero. Sed se la salo malboniĝas, per kio oni povas salii? Ĝi tiam taŭgas por nenio alie ol oni forĵetu ĝin kaj lasu la homojn dispietobati ĝin. Vi estas la lumo de la mondo. La urbo, kiu kuŝas sur monto, ne povas resti kaŝita. Ankaŭ oni ne ekbruligas lumon kaj metas ĝin sub buŝelon, sed sur kandelingon, tiam ĝi lumigas al ĉiuj, kiuj estas en la domo. Tial vi lasu lumigi vian lumon antaŭ la homoj — — —“

Kun aparta plezuro ni salutas la tradukon, kiun antaŭ nelonge aperigis nia majstro:

„La Predikanto, libro el la Biblio“, el la originalo tradukis D:ro L. L. Zamenhof — jen verko, kiun oni povas nomi modela en ĉiuj rilatoj. Tradukita de la plej kompetenta esperantisto el la originalo, presita sur bonan paperon, malmultege da preseraroj, kion oni povus peti plue. Certe ĉiu kun intereso legos en Esperanto „vortojn de la Predikanto, filo de Davido, reĝo en Jerusalemo“, kiu „decidis en sia koro es-

plori kaj ekzameni per la saĝo ĉion, kio fariĝas sub la ĉielo“ kaj kiu al ni prezentas profundan orientan filozofion de vivo.

Ĉe tradukoj de bibliaj libroj ni citu, ke la direkto de „Espero Katolika“ eldonas serion „Bibliaj studoj“, kies l:ra n:o estas:

Hebrea Kalendaro, kiun uzadis la Izraelidoj dum la jarcento de Jesuo-Kristo, originale verkita en Esperanto de Pastro Jakobo Bianchini. La 16-paĝa kajero enhavas tabelforman kalendaron kun klarigaj notoj por unu jaro.

Fine estu citita, ke „Espero Katolika“ ankaŭ eldonis verkon: »*Katolika Preĝaro, en kiu troviĝas ĉiuj dimanĉaj Diservoj kaj la plimulto de la Festoj de l'jaro, Latine kaj Esperante.* l:ra volumo. La verko, kiu estas bele presita kaj ŝajnas prezenti bonan Esperanton, certe estas kore salutata de la katolikaj esperantistoj. Ĝi enhavas preĝojn, litaniojn, mesojn kaj aliajn elementojn de la katolika Diservo, parte nur en Esperanto, parte ankaŭ en latina lingvo. Troviĝas tie interalie preĝo kun subskribo de Lia Plej Sankta Moŝto Pio X:a, pri kiu oni legas: „Konfesinte siajn pekojn kaj ricevinte la Sanktan Komuniiĝon, kiu ajn latine, (aŭ alilingve) diros tiun ĉi preĝon, eĉ longan tempo antaŭ la mortigo kaj en sano, akiros plenan indulgencon, kiun li ĝuos en la morta horo, laŭ la pureco de sia konscienco.“ — La verko estas 180-paĝa de malgranda formato kaj kostas ĉe eldoninto 2:50 frankojn.

A. A. Sola.

Esperantista Kantaro (kolekto unua). Esp. de L. E. Meier. Esperanta Eldonejo Hans Th. Hoffmann, Berlin.

Certe S:ro L. E. Meier, farinte tiujn ĉi tradukojn oferis bonan servon al esperantistaj kluboj kaj vesperkunvenoj, speciale por la gajaj „postludoj“ post la oficiala programo. Ĉiuj kantoj estas tradukoj el germanaj originaloj, kia nature kaŭzas, ke la spirito de l'kolekto estas pure germana — la kovrila vinjeto prezentas bierglasegon kaj gitaron. Tio por germanoj nature efikas hejman sentaron kaj al negermanoj donas interesan enrigardon en la germanan vivon. Ni do alesperas al la ebla daŭrigaĵo egale bonan sukceson kiel al la ĉikusanta volumeto. — J. A. W.

Valso Esperantista. De Dario Saavedra. Eldonis: Esperanta Eldonejo Hans Th. Hoffmann, Berlin.

Libreto pri transmorta vivo. De Gustav-Teodor Fechner, en esperanta traduko

de P. Kadik. Ĉe Presa Esperantista Societo, Paris.

Verketo, en kiu la aŭtoro lerte traktas la temon pri rilatoj inter la ĝismorta kaj la transmorta vivo, kiuj nur estas du malsimilaj formoj de sama vivo. Por ĉiuj esperantistoj, kiuj sin interesas je filozofiaj demandoj la bonefarita traduko estas rekomendinda. — H. M.



STATISTIKO ESPERANTISTA.

Aperis antaŭ nelonge la tria eldono de la *Esperantista Societaro*, eldonita dufoje ĉiujare de la Centra Oficejo.

La ciferoj estas tre interesaj kaj kurajgaj kaj ni volus precipe al la propagandistoj konsili, ke ili diskonigu tiujn ciferojn ĉar ili estas la plej efikaj pruviloj kaj konvinkiloj en ilia argumentado. Nia afero jam atingis tiun situacion, kiam oni plu ne devas uzi belajn vortojn por varbi novajn adeptojn, ne, per konvinkaj faktoj ni venkos la antaŭjuĝojn de la mondo.

El la nomita kajero ni eltiras la jenajn ciferojn, kiuj bone montras la konstantan progresadon de Esperanto.

1.e. Nombro de la urboj, en kiuj ekzistas konsulejoj, Agentejoj aŭ Oficejoj.

Afriko

	31 dec. 1906	30 jun. 1907
Alĝerio	1	1
Tunislando	1	1

Ameriko

Brazilo	—	1
Kanado	1	4
U. Ŝtatoj	2	3
Urugvajo	—	1

Azio

Japanujo	—	2
Rusujo Azia	1	1

Eŭropo

Aŭstrujo	9	10
Belgujo	12	12
Britujo	18	32
Bulgarujo	4	4
Danujo	—	1
Francujo	38	53
Germanujo	6	7
Hispanujo	6	9
Holandujo	1	1
Hungarujo	1	2

31 dec. 1906 30 jun. 1907

Italujo	2	3
Malto	2	2
Rusujo	2	5
Svedujo	2	2
Svisujo	11	13
Sume	120	170

2.e Ĉiusepacaj Esperantistaj Societoj.

Afriko

	Jan. 1905	Jan. 1906	Dec. 1906	Junio 1907
Alĝerio	1	1	3	3
Franca Gvineo	—	1	1	1
Madagaskar'	—	—	1	1
Tunislando	1	1	1	1

Ameriko

Bolivio	—	—	1	1
Brazilo	—	—	1	11
Ĉilo	1	1	2	2
Kanado	2	3	4	4
Meksiklando	1	—	1	4
Peruo	1	1	1	1
U. Ŝtatoj	—	8	18	44
Urugvajo	—	1	2	2

Azio

Hindujo	—	—	1	5
Japanujo	5	5	1	4
Koŝinhinujo	—	1	1	1
Rusujo Azia	3	3	3	3
Straits Settlements	—	—	—	1
Tonkino	—	1	1	1
Turkujo Azia	—	—	—	1

Eŭropo

Aŭstrujo	10	14	31	39
Belgujo	7	9	14	21
Britujo	36	55	90	103
Bulgarujo	12	12	15	16
Danujo	1	1	2	2
Francujo	56	101	123	156
Germanujo	22	32	39	49
Gibraltaro	—	—	—	1
Hispanujo	3	12	28	40
Holandujo	6	6	9	9
Hungarujo	1	1	1	2
Italujo	3	6	7	8
Malto	1	2	6	6
Monako	1	1	1	1
Norvegujo	—	—	—	4
Rusujo	5	7	20	26
Svedujo	3	8	18	20
Svisujo	6	9	30	39

Oceanio

Aŭstralio	—	1	1	2
Nova Zelando	—	2	4	4
Sume	188	306	482	639

3.e Profesiaj kaj fakaj societoj

Moralo, politiko	1	2	7
Artoj, sciencoj	3	5	11
Industrio, Komerco	1	3	12
Administracio	"	"	3
Distraĵoj	1	2	4
Diversaj	2	5	8
Sume	8	17	45

4.e Esperanta gazetaro.

Tute en Esperanto	7	10	11
Propagand. gazetoj	15	17	18
Sume	22	27	29

5.e Esperanto ekster la Esperantist

Naciaj gazetoj havantaj kronikojn en Esperanto	8	10	16
Kongresoj, kiuj rekomendis au akceptis la uzon de Esperanto	2	2	11
Societoj, kiuj korespondas en Esperanto	"	12	24

Koncerne la gazetoj ni rimarkas ilia nombro efektive estas ĉirkaŭ 5



GAZETOJ RICEVITAJ.

Lingvo Internacia (Junio, Julio); British Esperantist (Junio, Julio, Aŭg.); La Suno Hispana, (Julio, Aŭg.); Juna Esperantisto, (Junio, Julio, Aŭg.); Ruslanda Esperantisto (Majo, Junio, Julio); Ĉasopis Ĉeskych Esperantistů, (Junio—Julio); Afrika Esperantisto (Aŭg.); La Esperanta Instruisto (Sept.); La Revuo (Sept.).

ANONCOJ.

Hospits

Kristana loĝantejo por vojaĝanti

HELSINKI — VUORIK. 17.

— Telefono 34 24. —

Subskribinto deziras aĉeti plenan lektion de la manskribita Esp. gazeto eldonita en Tampere (Vidu Finna Esperantisto N:o 4 p. 19).

Adolf Reinberg
Åbo, Österlånggatan 39.